



# Boletín

n° 421 *Januario - Marto 2018*



*Asociación de utilidad pública*

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 421

Redakto-skipo  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.  
Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj  
\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn  
\*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro  
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es  
Aliaj aferoj (escepte de financaj):  
admin@esperanto.es

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7  
ES-28015 Madrid  
admin@esperanto.es  
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961  
TRIADOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025  
Poŝtelefono: +34 638 547 104  
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

### Estraro

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio  
**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López  
**Sekretario:** Águeda Biurrun  
**Kasisto:** Jesús M. García Iturrioz  
**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor  
Raúl Martínez  
Alejandro Escobedo (prezidanto  
de HEJS)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

# Salutvortoj

Karaj amikoj.

En tiu ĉi numero vi trovos kunvokon al la Ĝenerala Kunveno de la asocio kaj sekve multan materialon rilatan al nia agado en 2017 kaj la proponojn por tiu ĉi 2018.

Koncerne 2017, mi pensas ke ni povas esti sufiĉe kontentaj. Ni entreprenis multajn agadojn, kiel oni povas konstati en la Raporto pri Aktivaĵoj, kun ĝenerale bonaj rezultoj, se konsideri la modestecon de nia Federacio. Ĉio ĉi fakte devas instigo ne al singratulado, sed al kreskigo kaj klopodo por plibonigo de niaj iniciatoj. Ni estu ambiciaj ĉar nia tasko meritas la penon: en mondo kiu ŝajne tendencas al izoliĝo kaj enfermiteco, Esperanto montras alian vojon por interrilato kun la aliaj.

Rilate al tiu ĉi nova jaro, vi povas vidi ke ni dediĉas multan spacon en nia bulteno al la kongresoj okazontaj en nia lando en 2018. Ni fakte konsideras ilin tre gravaj ne nur pro la okazo renkontiĝi kun samideanoj, ĝui la etoson kaj malkovri la esperantan kulturon, kio tamen estas grave en si mem. Por ni, aparte de la Hispana Kongreso mem, la du aliaj ĉefaj internaciaj renkontoj, nome la kongreso de ILEI kaj la Internacia Junulara Kongreso, montriĝas tre gravaj ĉar ili tuŝas du aspektojn de nia agado kiujn la estraro konsideras strategiaj: la instruadon kaj la junularon.

Ni bezonas intensigi kaj plibonigi la instruadon de nia lingvo, kaj ni esperas ke la spertoj akiritaj ĉe niaj vizitantaj kolegoj povos helpi en la klopodoj kiujn niaj instruistoj kaj grupgvidantoj entreprenas por altigi la lingvonivelon de la novaj esperantistoj. Kaj speciale ĉe la junuloj, la renkontoj devus krome fariĝi la okazo konstati ke la lingvo funkcias, ĝui la esperantistan etoson kaj la senton de komunumo, kaj eksenti la emon resti ĉe la komunumo kaj aktivi en ĝi.

Mi invitas vin ĉiujn veni almenaŭ al unu el la kongresoj. Ni havos neripeteblan ŝancon, kaj ni ĉiuj lernos kaj ĝuos. Kion plian oni povas peti?

*José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF*

# ENHAVO

Salutvortoj	1
Asamblea General Ordinaria	3
Alvoko por Kongreso 2019	4
Cuentas Pérdidas y Ganancias	5
Balance Situación	6
Buĝeto	8
Raporto pri Aktivaĵoj 2017	9
Pri Grupoj kaj Asocioj	16
Propono de la grupo de Esperanto Guardamar	18
Libro prezentado en prestiĝa kulturcentro de Madrido	20
Informo pri la 77 Hispana Kongreso de Esperanto	21
Mendilo por la 77 Hispana Kongreso de Esperanto	23
Badajoz: Juna kaj Esperantista	24
Kunvoko por instrui en universitatnivela kurso	25
Mi pequeña gramática de Esperanto	26
Memore al Fabienne Berthelot	27
La 9a TAKE Esperanto Kubo	28
Forpasis Emilio Gastón Sanz	31
Forpasis Pepita de Caspary	32

---

## PERANTO EN HISPANIO

### PERANTO POR UEA, LA ONDO, MONATO, ILEI

**NOMO : PEDRO A. GARROTE ESCRIBANO**  
**BANKO: BANCO SANTANDER EN VALLADOLID**

**Antaŭe estis Banko Banesto (sed ĉi tiu banko ne plu ekzistas)**

**IBAN en formato electrónico : ES5600306002740000901271**  
**IBAN en formato papel :IBAN ES56 0030 6002 7400 0090 1271**

**La kotizo taŭgas por la tuta jaro. Bonvolu pagi en decembro aŭ januaro.**  
**Indiki al la peranto, telefone aŭ rete, la celon de la pago.**

**Hisperanto.uea@gmail.com Tlfn: 983.477.179**

# ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto invita a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el domingo 13 de mayo de 2018, a las 10:30 horas (a las 11:00 en segunda convocatoria) en la sede de la asociación, calle Rodríguez San Pedro, 13, 3º-7, de Madrid, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (24 de junio de 2017).
- 2.- Aprobación de las cuentas y tesorería del 2017.
- 3.- Aprobación de la Memoria de Actividades del 2017.
- 4.- Informe de los socios.
- 5.- Aprobación del Presupuesto para 2018.
- 6.- Cuotas para el año 2019.
- 7.- Información sobre los Congresos de Esperanto en España en 2018 y 2019
- 8.- Ruegos y preguntas.

**IMPORTANTE:** Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico, [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es) o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 11 de mayo.

**NOTA:** La Junta Directiva tiene prevista la convocatoria de una Asamblea General Extraordinaria que se celebrará el 21 de julio del 2018 durante el 77 Congreso Español de Esperanto en Madrid, durante la cual está previsto tratar temas ordinarios y otros planes de la asociación.

El Presidente de HEF

José Antonio del Barrio Unquera

## ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 13-an de majo de 2018 (dimanĉe), je la 10:30 horo (je la 11:00 horo en dua alvoko), en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-7, de Madrido, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (24 junio 2017).
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2017.
- 3.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2017.
- 4.- Informo pri la anaro.

- 5.- Aprobo de la Buĝeto por 2018.
- 6.- Kotizoj por la jaro 2019.
- 7.- Informoj pri la Esperanto-Kongresoj en Hispanio en 2018 kaj 2019.
- 8.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retroŝta adreso [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es), aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 11-a de majo.

NOTO: La Estraro antaŭvidas la kunvokon de Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de la asocio, kiu okazos la 21-an de julio 2018 dum la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto en Madrido, dum kiu estas planite pritrakti ordinarajn temojn kaj aliajn planojn de la asocio.

La Prezidanto de HEF

José Antonio del Barrio Unquera

---

## ALVOKO POR KONGRESO EN 2019

Dum la venontaj semajnoj, la estraro de HEF pritraktos la elekton de kongresurbo por la Hispana Kongreso de Esperanto en 2019, kaj informos pri la decidoj en la Ĝenerala Kunveno de 2018.

Ĝis nun alvenis unu kandidatiĝo: profiti la okazigon de la Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), kiu estas planata por la komenco de majo 2019 en Malago, por kune ĝui la Hispanan Kongreson.

Tamen, la decido ne estas prenita ĝis nun, kaj do la estraro decidis alvoki la lokajn grupojn kaj aktivulojn prezenti siajn kandidatiĝojn pro la okazigo de la Kongreso. Memoru ke vi havas je via dispono la Kongresan Regularon aprobitan en 2012, kiun ni volante sendos al interesiĝantoj.

Kuraĝu! Kongreso estas bona maniero videbligi Esperanton loke, kaj vi certe povos kalkuli je la kunlaboro de la tuta asocio. Sendu viajn proponojn al la adresoj de HEF antaŭ la fino de aprilo.

## BALANCE DE SITUACIÓN

	<u>2017</u>	<u>2016</u>
<b><u>ACTIVO</u></b>		
<b>A) ACTIVO NO CORRIENTE</b>	<b>62.390,91</b>	<b>62.390,91</b>
II. Inmovilizado material	62.390,91	62.390,91
1. Terrenos y construcciones	60.101,21	60.101,21
211. Construcciones	60.101,21	60.101,21
2. Otro inmovilizado material	2.289,70	2.289,70
232. Biblioteca	2.289,70	2.289,70
<b>B) ACTIVO CORRIENTE</b>	<b>40.813,42</b>	<b>41.663,16</b>
II. Existencias	2.828,22	3.026,70
1. Comerciales	2.828,22	3.026,70
300. Libros y material diverso	2.828,22	3.026,70
III. Usuarios y Deudores Varios	-	1.098,00
3. Patrocinadores, Afiliados y Otros Deudores	-	1.098,00
447. Patrocinadores, Afiliados y Otros Deudores	-	1.098,00
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes	37.985,20	37.538,46
1. Tesorería	37.985,20	37.538,46
570. Caja, euros	112,21	16,11
572. Bancos e instituciones de crédito c/c vista, euros	37.872,99	37.522,35
<b>TOTAL ACTIVO</b>	<b>103.204,33</b>	<b>104.054,07</b>
<b><u>PASIVO</u></b>	<b><u>2017</u></b>	<b><u>2016</u></b>
<b>A) PATRIMONIO NETO</b>	<b>103.204,33</b>	<b>103.869,15</b>
A1) Fondos propios	103.204,33	103.869,15
I. Capital	103.869,15	101.680,76
101. Fondo Social	103.869,15	101.680,76
V. Resultados de ejercicios anteriores	-	-72,76
121. Resultados negativos de ejercicios anteriores	-	-72,76
VII. Resultado del ejercicio	-664,82	2.261,15
129. Resultado del ejercicio	-664,82	2.261,15
<b>C) PASIVO CORRIENTE</b>	<b>-</b>	<b>184,92</b>
V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar	-	184,92
3. Acreedores varios	-	184,92
410. Acreedores por prestaciones de servicios	-	184,92
<b>TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO</b>	<b>103.204,33</b>	<b>104.054,07</b>

## CUENTA DE PÉRDIDAS Y GANANCIAS

	<b>2017</b>	<b>2016</b>
1. Ingresos Afectos a la Actividad	7.977,00	17.311,20
<b>c) Ingresos propios de la entidad</b>	<b>7.977,00</b>	<b>17.311,20</b>
4. Aprovisionamientos	-268,71	304,66
<b>a) Consumo de mercaderías</b>	<b>-268,71</b>	<b>304,66</b>
5. Otros Ingresos de la Actividad	2.606,95	5.702,80
<b>a) Ingresos accesorios y otros de gestión corriente</b>	<b>2.606,95</b>	<b>702,80</b>
<b>b) Subvenciones, Donaciones y Legados</b>	<b>-</b>	<b>5.000,00</b>
7. Otros Gastos de la Actividad	-10.980,06	-21.063,01
<b>a) Servicios Exteriores</b>	<b>-10.980,06</b>	<b>-21.063,01</b>
<b>A.1) RESULTADO DE LA ACTIVIDAD</b>	<b>-664,82</b>	<b>2.255,65</b>
14. Ingresos Financieros	-	5,50
b2) De Instrumentos Financieros en Terceros	-	5,50
<b>A.2) RESULTADO FINANCIERO</b>	<b>-</b>	<b>5,50</b>
<b>A.3) RESULTADO ANTES DE IMPUESTOS</b>	<b>-664,82</b>	<b>2.261,15</b>
<b>A.4) RESULTADO PROCEDENTE DE OPERACIONES CONTINUADAS</b>	<b>-664,82</b>	<b>2.261,15</b>
<b>A.5) RESULTADO DEL EJERCICIO</b>	<b>-664,82</b>	<b>2.261,15</b>

**NOTO:** La kontoj prezentitaj en la hispana lingvo sekvas la normojn pri kontotenado, kaj ne konsideras enspezojn ricevitajn en 2017 sed kiuj korespondas al aktivaĵoj de la jaroj 2016 aŭ 2018 (ekz. subvencioj por kongresoj aŭ kotizoj).

En la sekva paĝo, en Esperanto, ni detaligas la elspezojn kaj enspezojn en pli klara maniero, kun ĉiuj spezoj kiuj eniris niajn kontojn en la jaro 2017

## DETALE SPEZOKONTO 2017

<u>ENSPEZOJ</u>			<u>ELSPEZOJ</u>	
HEF-KOTIZOJ	5.962,00		BOLETÍN	-2.692,25
LIBROSERVO	2.606,95		KONGRESO (Teruel 2017)	-1.925,88
KONGRESO Teruel 2017	1.450,00	(*)	LIBROELDONOJ	-1.405,60
KONGRESO Herrera 2016	1.300,00		RETO KAJ KOMPUTILAĴOJ	-1.033,84
KONGRESO Madrid 2018	196,00		PROPAGANDO	-822,96
MEL-UZO SIDEJO	150,00		SIDEJO - KOMUNUMO	-796,92
DONACOJ	17,00		REPREZENTADO	-719,65
			TELEFONO	-632,20
<u>SUMO ENSPEZOJ:</u>	<u>11.681,95</u>		KOTIZO AL UEA	-376,32
			ELEKTRO	-228,21
			MAKLERAĴOJ	-222,29
			DIVERSAJ	-155,77
			ASEKURO	-126,60
			LIBROAĈETOJ	-70,23
			<b><u>SUMO ELSPEZOJ:</u></b>	<b><u>-11.208,72</u></b>

SALDO 31/12/2016:	37.511,97
SALDO 31/12/2017:	37.985,20
PODETALE (31/12/2017):	
BBVA	27.708,98
TRIODOS-2	4.007,27
TRIODOS-1	3.200,77
UEA-konto	2.732,12
PAY PAL	223,85
SIDEJA KASO	112,21
SUMO:	37.985,20

(\*) En la enspezoj pro la kongreso de Teruel ne aperas la kotizoj enkontigitaj en 2016 nek la subvencioj aprobitaj, kiujn ni ricevos en 2018.



## PRESUPUESTO 2018

<b>PRESUPUESTO 2018</b>			
<b><u>GASTOS</u></b>		<b><u>INGRESOS</u></b>	
<b>2. APROVISIONAMIENTOS.</b>		<b>1. INGRESOS AFECTOS A LA ACTIVIDAD</b>	
Compra de libros, de material didáctico y variación de existencias	1.300,00	Prestaciones de Servicios (Servicio libros, cursos...)	2.800,00
		Cuotas socios	6.200,00
<b>4. OTROS GASTOS DE LA ACTIVIDAD</b>		<b>5. OTROS INGRESOS DE LA ACTIVIDAD</b>	
Otras Campañas y Publicidad	3.100,00	Subvenciones	1.500,00
Boletín	2.800,00	Ingresos por Congresos	1.500,00
Servidor y Dominios Internet	1.500,00		
Comunidad Vecinos	850,00		
Teléfono	700,00		
Comisiones Bancarias y Similares	300,00		
Correo	300,00		
Gastos Varios	250,00		
Suministros (electricidad)	250,00		
Aportaciones a UEA	200,00		
Material Oficina	200,00		
Primas de Seguros	150,00		
Reparaciones y Mantenimiento	100,00		
<b>TOTAL GASTOS</b>	<b>12.000,00</b>	<b>TOTAL INGRESOS</b>	<b>12.000,00</b>

# RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ 2017

## 1. INTERNA ADMINISTRADO

1.1. La estraro kunsidis 6 fojojn

1.2. Okazis unu ĝenerala kunveno ordinara en Teruelo, la 24an de junio, dum la Hispana Kongreso 2017.

1.3. Dum la Ĝenerala Kunveno okazis parta renovigo de la estraro per la elekto de nova kasisto, Jesús Miguel García Iturrioz. La estraro (2016-2020) estas nun: Prezidanto: José Antonio del Barrio; Vicprezidanto: Ángel Arquillos; Sekretario: Águeda Biurrún; Kasisto: Jesús Manuel García Iturrioz, Voĉdonantoj: Eduardo Berdor, Raúl Martínez kaj Alejandro Escobedo (ĉi-lasta ankaŭ Prezidanto de HEJS).

1.4. Oni eldonis kvar numerojn de “Boletín” (417, 418, 419 kaj 420).

1.5. Biblioteko *Juan Regulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj interesatoj, tamen nur HEF-anoj rajtas pruntepreni. Ĝi riĉiĝis per 52 novaj eroj.

1.6. Bitoteko: HEF plu flegas la bitan bibliotekon, *Bitoteko*, kies materialo estas alirebla rete, kaj kiu apartenas al la retoj *Hispana* kaj *Europeana*. Dum 2017 oni aldonis pli da materialo.

1.7. Daŭris la sendado de la “Bitulteno”, informilo sendata restpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj. Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta), kaj la nunaj ricevantoj estas pli ol 1000.

1.8. HEF-retpaĝo: dum 2017 ĝi ricevas proksimume 2000 vizitojn semajne.

1.9. Sociaj retoj: HEF kaj HEJS havas kontojn en *Facebook* (1500 ŝatantoj) kaj *Twitter* (1100 sekvantoj), kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivaĵoj kaj pri E-o. Oni aldonis pliajn videojn al la kanalo de HEF en *Youtube* (entute la filmetoj de la kanaloj jam estis spektitaj pli ol 120.000 fojojn). Ankaŭ funkcias diskutkanalo en *Telegram*.

## 2. ASOCIOJ

2.1. La lokaj kaj regionaj grupoj daŭrigas sian funkciadon.

2.2. Organiziĝis Kultura Asocio de Esperanto en Katalunio, por organizi aktivadojn tie kaj speciale la Internacian Semajnon.

2.3. La grupo en Guardamar de Segura prezentiĝis publike en decembro 2017.

## 3. INSTRUADO KAJ TREJNADO

3.1. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato, precipe organizitaj de la lokaj kluboj.

3.2. Unu membro de HEF finis la Interlingvistikajn Studojn de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando kaj alia komencis la novan sesion de la Studoj.

3.3. Meze de oktobro komenciĝis en la Universitato de Seviljo universitata kurso “Esperanto: akademia lingvo“, kun agnosko de 6 kredit-poentoj, validaj por ĉiuj fakoj de la Universitato kaj kun ĉeesta daŭro de 3 horoj semajne. La aktivado daŭros ĝis meze de junio 2018 kaj la fina celo estas faciligi la atingon de la oficiala diplomo de la nivelo B1.

3.3. Ankaŭ en la Universitato de Seviljo, ene de la Fakultato de Psikologio, estas studobjekto nomita "Metodología Cualitativa". Ĉiujare la studentoj lernas pere de la esplorado konkretan aferon. Ĉi tiu kurso temas pri Lingva subpremado kaj Esperanto kiel liberigilo.

3.4. Fine de oktobro komenciĝis kurso de Esperanto en la Oficiala Lingvolernejo de Fuenlabrada (Madrida Regiono)

3.5. Post la Hispana Kongreso 2017 okazis en Teruelo AMo-Seminario (Seminario por Aktivula Maturiĝo), sponsorita de UEA.

3.6. Dum 2017 nia junulara sekcio, HEJS, partoprenis en projekto organizita de la tutmonda asocio TEJO kaj subvenciita de la Eŭropa Unio, pri trejnado de junulaj aktivuloj. Po du junuloj el Hispanio partoprenis en eventoj organizataj de eŭropaj junularaj esperantistaj organizaĵoj. Post la Kongreso de Teruel okazis TEJO-Seminario organizita de HEJS, ene de tiu programo kaj partoprenata de junuloj el aliaj eŭropaj landoj.

## **4. KONGRESOJ**

### **Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj**

4.1. 76a Hispana Kongreso okazis en Teruel, inter la 23a kaj 25a de junio. Partoprenis ĉirkaŭ 155 homoj. Ĝi estis tre sukcesa evento kun granda kvanto de alkvalitaj programeroj. La Kongreso estis prezentita en la Casa de Aragón, en Madrido.

4.2. 25a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Tossa de Mar (Katalunio), 30a septembro- 7a de oktobro de 2017.

4.3. E-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta ŝtato dum la dua semajno de decembro.

### **Partoprenataj de membroj de HEF**

4.4. 102a Universala Kongreso en Seulo (Koreio), inter la 22a kaj 29a de julio de 2017. Ángel Arquillos agis kiel B-Komitatano de HEF kaj zorgis pri la budo de HEF en la Movada Foiro.

4.5. 73-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, okazinta de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2017 en Aneho, Togolando. Partoprenis reprezentanto de HEJS.

4.6. 38a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazinta inter la 12a kaj la 15a de oktobro en Àger-Montsec (Lleida).

4.7. 90a SAT-Kongreso en Gimpo (Seulo), inter la 29a de julio kaj 5a de aŭgusto de 2017.

4.8. 32a ARKONES en Poznano (Pollando) inter la 21a kaj 22a de septembro, partoprenata de membro de HEF.

### **Planataj de HEF**

4.9. HEF atingis ke la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazos en 2018 en Madrido. Oni jam komencis en 2017 la organizadon de tiu evento.

4.10. Same, la venontjara Internacia Junulara Kongreso okazos inter la 4a kaj 11a de aŭgusto 2018 en la ekstrema urbo Badaĥozo (Badajoz), kunorganizata de la junulara sekcio HEJS.

## **5. INSTITUCIA KUNLABORO**

### **Kampanjo por la Zamenhof-Jaro**

5.1. Okaze de la kunmemoro de la 100-a datreveno de la forpaso de D-ro Zamenhof, HEF organizis kampanjon por omaĝi lian figuron kaj diskonigi la lingvon Esperanton. Oni kunlaboris kun diversaj institucioj por informi la publikon.

5.2. Kiel inaŭguro de la Jaro Zamenhof, en Madrid, de la 20a de januaro ĝis la 10a de februaro, estis inaŭgurita ekspozicio pri Esperanto, kunlabore kun la Pola Instituto pri Kulturo, en la Publika Biblioteko de la kvartalo Vallecas, kie situas la t.n. Centro de Pola Kulturintereso de Madrido. La 9an de februaro, okazis prezentado de la Jaro Zamenhof, kun gvidata vizito al la ekspozicio.

5.3. La 2an de februaro, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis pri Dro. Zamenhof, lia verko kaj ideoj en la Centro Sefarad-Israel.

### **Institucia Kunlaboro**

5.4. La 8a de aŭgusto, la Nacia Organizaĵo de Hispanaj Blinduloj (ONCE) eldonis ekzempleron de sia konata loteribileteto omaĝantan D-ron Zamenhof, okaze de la centa datreveno de lia morto.

5.5. La 20an de aprilo, Tago de la Libro, la Kongreso de Deputitoj de Hispanio organizis prezentadon de ekzempleroj de tradukoj de Don Quijote, donacitaj al ties Biblioteko fare de eksterlandaj ambasadoj. La respondeculoj akceptis la donacon de ekzemplero de la versio en Esperanto de la fama verko, kaj invitis nian asocion al la solena ceremonio en la Parlamentejo.

5.6. Okaze de la Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo estis inaŭgurita en tiu urbo la “Glorieta de Esperanto”, la plej nova ZEO en Hispanio, kun ĉeesto de magistratano de la urbo.

5.7. La 16-an de decembro estis celebrata en Torrox (provinco Malago, Andaluzio) solena kunmemoro al la 30-a datreveno de la strato Esperanto en la urbo, kaj memore al la loka esperantisto Antonio González, ĝuste en tiu sama strato, kiun partoprenis interalie la vicprezidanto de HEF.

## **6. ELDONADO**

6.1. Okaze de la Jaro Zamenhof, HEF sponsoris la eldonadon de la verko “La calle

Zamenhof”, hispanlingva traduko de “La Zamenhof-strato”, de Roman Dobrzynski, kun interparolo kun D-ro Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de Zamenhof. La libro estis prezentita en Madrido kunlabore kun la Pola Kulturinstituto kaj la Centro Sefarad-Israel, por la juda kulturo, kun ĉeesto de la aŭtoro. Tiu libro estis prezentita ankaŭ en Zaragozo, en la Biblioteko de Aragono. La prezentado por esperantistoj okazis en Teruelo, dum la Hispana Kongreso.

6.2. Okaze de la kongreso de Teruelo, la asocio Liberanimo eldonis la libron “La defio vivi kaj krei”, traduko de teatraĵo de la aŭtoro Fernando J. López.

6.3. En novembro, okaze la datreveno de la morto de la poeto Miguel Hernández, HEF publikigis duan eldonon de la verko “Miguel Hernández, poeto de l’popolo”, antologio de poemoj tradukitaj de Miguel Fernández. La libro estis prezentita al la ĝenerala publika en Alikanto, ene de Internacia Kongreso pri la poeto.

## **7. DISVASTIGO**

### **Ekspozicioj**

7.1. La ekspozicio kun paneloj pri Esperanto pretigita de HEF estis montrita komence de januaro 2017 en Valencio, en la Kultura Spaco de la Publika Biblioteko Clara Santiró i Font de la Kultura Centro La Rambleta.

7.2. La 3an de marto, la Prezidantoj de la Federacio kaj de la loka klubo “Lumradio”, inauguris ekspozicion pri Esperanto en la Teatro Liceo de Cheste (Valencio). Partoprenis ankaŭ la urbestro de la urbo kaj urbkonsilisto pri kulturo.

7.3. Inter la 8a kaj 30a de majo la ekspozicio de paneloj de Hispana Esperanto-Federacio montriĝis en la publika biblioteko de Aguilar de Campoo (Palencio). Por la inaŭguro okazis prelego de la Prezidanto, Jose Antonio del Barrio.

7.4. Inter la 15 kaj 27 de decembro 2017, la ekspozicio estis montrata en la Casa dos Poetas, Fundación Curros Enríquez (Celanova, Orense). La 26-an la prezidanto de HEF prelegis en tiu institucio.

7.5. La ekspozicio estis montrata en aliaj lokoj en la lando, akompanante aliajn aktivadojn, inter ili, la Biblioteca Pública de Vallecas (Madrid), la Fakultatoj de Psikologio kaj Edukado en la Universitato de Sevilo, la Caja Rural de Teruel, la Ateneo Republicano de Fortanete (Teruel) kaj la Universidad San Jorge (Zaragoza). Entute okazis 10 ekspozicioj.

7.6. Dum la Hispana Esperanto-Kongreso oni montris ekspozicion pri la historia esperantisto Francisco Azorín Izquierdo. Krome, estis organizita omaĝo en kiu partoprenis lia nepo Ernesto Azorín, la prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio, Mallely Martínez, la historiisto Serafín Aldecoa kaj reprezentantoj de HEF kaj de la aragona asocio.

### **Publikaj prezentoj**

7.7. La 21an de aprilo disvolviĝis en la Fakultato pri Edukado de la Universitato de Sevilo la kurso “Esperanto kaj sociaj sciencoj”, organizita de komunuma grupo por

aktivado, kun apogo de universitataj departementoj. En la kurso prelegis interalie la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, membroj de la loka grupo kaj universitataj profesoroj.

7.8. Tradicia legado de “Don Kiĥoto” dum la Internacia Tago de la Libro (23a aprilo) en Madrido (Círculo de Bellas Artes): du esperantistoj legis paragrafojn de la esperanta traduko de la verko.

7.9. En aprilo, okaze de oficiala renkonto de Oficialaj Lingvolernejoj en Valencio, oni programis muzikan festivalon 'MuLTiLiNGuS', t.e. koncerton kun popolaj kantoj en multnombraj lingvoj, inklude de la germana, angla, japana, franca, rusa, ĝita, rumana, araba, portugala, eŭska, galega, valencia, hispana kaj Esperanto. Pri la internacia lingvo, krom la eŭska, zorgis ano de HEF.

7.10. La 25an de majo la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio estis invitita partopreni en kolokvo pri "novaj utopioj", en iniciato pri novaj teknologioj ĉe laboratorio de ideoj de la urbestro de Madrido, festivalo "Spectrumfest".

7.11. En majo, ene de la artisma iniciato “Graffitea” en Cheste (Valencio), estis pentrita granda murpentraĵo (grafitio) kun teksto en Esperanto omaĝe al la esperantista pioniro Francisco Máñez, en ties iama naskiĝdomo. Pri ĝi zorgis la grupo “Cheko’s Art”, el Lecce (Italio), kun la kunlaboro de la esperantista grupo "Lumradio" de Cheste.

7.12. Membroj de Astura Esperanto-Asocio prelegis en la urbo Mieres pri la temo "Esperanto kaj laborista mondo: cent jaroj de revo de unueco inter laboristoj", organizita de la asocio “Amikoj de Mieres” kaj la klubo “La Nueva España”.

7.13. La Respublikana Ateneo de Fortanete (Teruelo), invitis la esperantistan teruelan grupon Liberanimo kunlabori en aktivado pri historio. Dum la semajno estis vizitebla ekspozicio pri Esperanto, kaj la 25-an de aŭgusto la prezidanto de Liberanimo Alberto Granados prelegis pri la lingvo.

7.14. Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, fine de septembro en Madrido, la asocio de naciaj institutoj de lingvoj, EUNIC, organizis serion de mikrokursoj, kaj oni invitis la Federacion por gvidi prezentadon kaj kurseton de Esperanto.

7.15. En Zaragozo, la departemento de tradukado de la privata Universitato San Jorge, organizis la 26an de septembro la Semajnon de la Lingvoj kaj Kulturoj, ĉijare dediĉitan al la planlingvoj. Dum tiuj ĉi tagoj montriĝis la ekspozicio pri Esperanto pretigitan de HEF, kaj okazis prelego pri Esperanto gvidita de Eduardo Berdor kaj Lorenzo Noguerro, inter aliaj.

7.16. En Cheste (Valencio) oni programis serion da aktivaĵoj pri la nunaj migradoj, kiuj taŭgis kiel omaĝo al la aŭstraj infanoj gastigitaj post la Unua Mondmilito en Hispanio, pro iniciato de la esperantistoj de diversaj urboj de Hispanio, kaj specife de tiu urbo kiu dum tiu periodo estis grava en la movado en Hispanio.

## Libroprezentadoj

7.17. Okaze de la 75-a kunmemoro de la morto de la poeto Miguel Hernández, la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, kaj la tradukisto, Miguel Fernández partoprenis Kongreson pri la poeto inter la 15-a kaj 18-a de novembro en la provinco Alikanto. Ili prezentis la lingvon en la akademiano parto de la kongreso, kaj ankaŭ la duan eldonon de antologio de poemoj de la aŭtoro, korektitan kaj ampleksigitan, prezentos en la sidejo de la Kulturinstituto Juan Gil-Albert de la urbo Alikanto.

7.18. Membroj de HEF kunlaboris en la prezentado de la libro “Tagoj kaj ruinoj”, eldonita de la asocio SAT-en-Hispanio, unue antaŭ esperantista publiko, kaj ankaŭ en publikaj asocioj de Madrido kaj Barcelono.

7.19. Membro de HEF kunlaboris en la eldono de "Antaŭ unu jarcento", kolekto de tekstoj eldonita de SAT pri la Unua Mondmilito kaj Esperanto, kaj prezentita publike en decembro ĉe la madruda grupo.

## 8. AMASMEDIOJ

8.1. La gazetara servo de HEF sendis 10 gazetarajn komunikojn, pri aferoj diversaj, inter alie: Jaro Zamenhof, jaraj kongresoj, esperanta Libro-Tago, ekspozicioj, prelegoj, prezentado de libroj, ktp.

8.2. Sekve al tiuj komunikoj aŭ aliaj agadoj, aperis dum 2017 ĉirkaŭ 60 aludoj, notoj aŭ artikoloj pri HEF aŭ pri Esperanto en ĵurnaloj (kaj paperaj kaj retaj). Kelkaj el tiuj aludoj aperis en naciaj ĵurnaloj, foje ĉe la unua paĝo.

8.3. La 14an de aprilo oni kunmemoris la centan datrevenon de la forpaso de D-ro Zamenhof, la iniciatinto de nia lingvo. Diversaj amaskomunikiloj en Hispanio eĥis la kunmemoron profitante la komunikon senditan de HEF.

8.4. Dum la HK en Teruelo, la lokaj radioj kaj la regionaj ĵurnaloj informis pri la Kongreso kaj eventuale intervjuis la prezidantojn de la loka kongresa komitato, Alberto Granados, aŭ de HEF, José Antonio del Barrio, kaj eĉ foje iujn partoprenantojn. Speciale grava estis la publikigo, la tagon post la inaŭguro, en “Diario de Teruel”, de tuta paĝo verkita en Esperanto, kun intervjuo al la poeto Miguel Fernández kaj de opiniartikolo verkita de José A. del Barrio.

8.5. Aperis 8 informoj pri HEF aŭ pri Esperanto en diversaj radio-stacioj aŭ televidprogramoj. Apartaj gravaj aperoj okazis kadre de la vizito de la prezidanto de HEF al Parlamentejo, okaze de donaco per kelkaj ambasadoj de tradukitaj ekzempleroj de “Don Quijote” al ties biblioteko. Ĉar HEF ankaŭ donacis esperantigitan ekzempleron, tiu libro kaj la lingvo mem aperis en la disvastigaj kanaloj de la Parlamentejo kaj en la sekvintaj notoj de la ĵurnalaroj.

8.6. Per la titolo “Andaluza filmproduktejo revolucias la mondon de Esperanto en la reto” la 15an de januaro la informa programo de la andaluza regiona televido Canal Sur elsendis raporton pri Babelo Filmoj, la kanalo pri mallongaj videoj en Esperanto por infanoj kaj lernantoj.

## 9. ALIAJ KULTURAJ AKTIVAĴOJ

9.1. Aperis la traduko en Esperanto de la plej populara verko el la nuntempa galega literatura, kun la titolo “Memoraĵoj de kampara knabo”. Verkita de Xosé Neira Vilas kaj tradukita de la filologo esperantista Suso Moinhos. La libro estas disponebla en la Libro-servo de HEF.

9.2. En marto, la eldonejo Lastura publikigis poemaron de la konata hispana poetino María Ángeles Maeso en dulingva (hispana-esperanta) versio. Temas pri la tria eldono de la sukcesa poemaro 'Vamos, vemos', kiu en 2003 ricevis la Internacian Poezi-Premion León Felipe. La E-poeto Miguel Fernández okupiĝis pri la traduko kaj pri la prologo al tiu ĉi tria eldono, titolita "Vamos, vemos - Ni iras, vidas".

9.3. En majo, Miguel Fernández partoprenis en migra poemdeklamado en diversaj placoj de la populara kvartalo Malasaña en Madrido, kune kun aliaj 25 hispanaj gepoetoj, kiel programero de VersoLab, la poezia flanko de la plurfaka festivalo LaborArte. Li deklamis poemojn siajn, de Jorge Camacho kaj de aliaj poetoj, en Esperanto aŭ ties hispana versio.

9.4. Poemoj en Esperanto aperis en la poezirevuo “Caja de Resistencia”, hispana duonjara ret-revuo pri nuntempa soci-kritika poezio. En 2017 aperis prezentado de nia ĉina poeto Mao Zifu kaj de du el liaj poemoj, kun traduko al la hispana fare de Miguel Fernández. Ankaŭ aperis tekstoj kun rilato al Esperanto en “Humanitat Nova”, dulingva (kataluna-hispana) ĉiujara revuo pri liberecanaj kulturoj, produktita de la majorka eldonejo Calumnia.

9.5. En aprilo, tri E-poetoj kaj anoj de HEF, Ana Manero, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández, grupe kun du famaj hispanlingvaj kolegoj, María Ángeles Maeso kaj Alberto García-Teresa, prezentis dulingve (hispane-esperante) poezian vesperon en la madrida memmastrumata kulturcentro EKO, kadre de la liberecanaj kulturaj renkontiĝoj JACA3.

9.6. En oktobro, la membroj de HEF Miguel Fernández, Ana Manero kaj Javier Romero partoprenis en Varsovio en la Kultura kaj Lingva Festivalo okaze de la Jaro Zamenhof (la kunmemoro de la centjara datreveno de la morto de D-ro Lazaro Zamenhof).

9.6. Ankaŭ okaze de la Tago de Esperanto, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kaj la barcelona esploristo Javier Alcalde partoprenis en la Simpozio pri la heredaĵo de D-ro Zamenhof, en Varsovio.

9.7. Du membroj de HEF, la elstaraj verkistoj kaj tradukistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutierrez Adúriz plu aktivis kiel Prezidanto kaj Sekretario, respektive, de la skipo de gvidantoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

9.8. Dum la Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj Turismo, la premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Ana Manero pro ŝia meritplena laboro por Esperanto en Hispanio.

Originalo subskribita de la Sekretario Águeda Biurrún



# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## ANDALUZIO

### MALAGO

Dum tri tagoj, la 8an, 9an kaj 10an de marto, vendredo, sabato kaj dimanĉo, du gravaj membroj de IFEF: Rodica Todor kaj Vito Tornillo (vidu fotojn), vizitis Malagon kun la celo kunaranĝi la venontan kongreson okazonta en Malago, de la 3a ĝis la 10a de majo 2019. Carlos Spinola, Marilo Torres kaj mi, aktive laboris antaŭ ol ilia alveno kaj nia laboro sukcesis, ĉar krom trovi decan kongresejon ni faris interesan provizoran programon dum preskaŭ tutan tagon. Al la programo ne mankas interesaj prelegoj nek kulturaj aferoj kiel:

ekskursoj al Antequera, Kordovo, ĉirkaŭaĵoj de Kordovo, Malago mem, eble Mijas, interalie. La vizito daŭris tri tagojn, kiuj sufiĉis por aranĝi interesan provizoran programon. Nun restas al ni en Malago, munti filmeton pri la evento kun diversaj bildoj el kelkaj lokoj pri nia provinco kaj eblaj ekskursoj. Venontan majon ni kunvojaĝos al Vroklavo kun la celo ĉeesti la IFEF Kongreson kaj prezenti nian urbon al la ĉeestontaro kaj preni la flagon.



### Vizitoj de esperantistoj al Malago dum la monato marto

Sylvie Roquet vizitis nin dum tri tagoj kaj malgraŭ la pluvo ni akompanis ŝin kaj kunmanĝis kaj kafumis en la Cafetería Esperanto, kie ni jam kutimas kunsidi kun esperantistoj.

Kelkaj tagoj poste alvenis du geamikoj,



José María Serrano kaj Andrea, katalunaj esperantistoj kun kiuj ni tagmanĝis proksime de la ŝiphaveno, ĉar ili haltis nur kelkajn horojn profitante libertempan promenadon, ĉar ili ĝuis krosadon tra la Mediteranea Maro.

## NI MEMORAS ELSTARAN ESPERANTISTON



En januaro oni solenis la 25-an datrevenon de la forpaso de Juan Régulo Pérez, la ĉefa eldonisto de libroj en Esperanto meze de la pasinta jarcento, kaj Hispana Esperanto-Federacio tion memoris per prelegaro omaĝe al lia figuro, en nia sidejo, fare de la prezidanto de la Federacio, José Antonio del Barrio, kaj de la poetoj Miguel Fernández kaj Jorge Camacho. Ankaŭ en Granda Kanario la loka grupo organizis modestan omaĝon dum la kunveno de la grupo (vidu supran foton). Dum tiu ĉi jaro ni antaŭvidas pliajn informojn, pri kiuj ni informos siatempe.

Al la omaĝo aldoniĝis la revuo "La Ondo de Esperanto" per artikolo en ties januara numero kun lia biografio; ĝi devenas el la libro *Nia diligenta kolegaro*, ĵus eldonita, kiu entenas la biografiojn de kelkaj el la plej elstaraj aktivistoj en la historio de la internacia lingvo.

### VALENCIO

Vendredon la 8an de marto, grava itala esperantistino, Laŭra Brazzabeni, ĉeestis nian kurseton de Esperanto por ne komencantoj, kie ŝi partoprenis kaj partigis la instruadon kun la instruisto Elías.



Kaj poste ŝi vizitis nin en nia grupejo, kie mi fotis tiun fotoĵon pri ŝi kaj du aliaj esperantistoj: Luis kaj Sempere

Elías Hdez. Capdevila

## PROPONO DE LA GRUPO DE ESPERANTO GUARDAMAR POR DEDIĈI PUBLIKAN SPACON DE LA URBO GUARDAMAR DEL SEGURA MEMORE AL DON RICARDO CODORNÍU Y STÁRICO KAJ AL ESPERANTO



Dum la okdekaj jaroj, grupo de homoj en Guardamar interesiĝis pri la studado kaj disvastigado de Esperanto kiel internacia lingvo. Nuntempe ĉi tiu kolektiva grupo de geesperantis-toj, krom daŭre aktivadi en ĝia programo pri lernado kaj disvastigado de la lingvo Esperanto, intencas preteriri kaj partopreni aktive kun la Hispana Esperanto-Federacio kaj aliaj asocioj. Ĝia celo estas dis-

vastigi la lingvon per kreado de kulturaj kunsidoj ĉe Guardamar kun la intenco fari ĉi urbon kiel deirpunkto por ĉiuj homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto.

Do, ĉi-jare 2018, la Grupo Esperanto Guardamar estas kreinta kalendaron pri aktivado por situi al Guardamar en la kultura agendo rilate al Esperanto, t.e. kun la intenco ke Guardamar estu ejo kie Esperanto, krom lingvo kiun oni studas kaj disvastigas, taŭgos por okazigi kongresojn aŭ sociajn kaj kulturajn kunsidojn, kun Esperanto kiel ĉefa akso por montri kaj instrui pri la historio kaj pejzaĝoj de nia municipo.

La unua paŝo jam estis farita per la kreado de “Rodal Eco-Literario Esperantista” ĉe la pinarbaro kie troviĝis la pino, kiu Guardamar dediĉis al unu el siaj ĉefaj bonfarantoj:



Don Ricardo Codorníu y Stárico. Ankaŭ oni prezentis ĉe la Kulturdomo ekspozicion pri Esperanto kaj la rilato de Codorníu kun la internacia lingvo kiun li enirigis en Hispanion.

Codorníu naskiĝis en Cartagena la 6an de junio de 1846. Li estis arbar-inĝeniero, konata pro la protektado de la ekologio kaj ankaŭ pri sia faceto de esperantisto. Li nomis sin "La Esperantisto" kaj li estis konata kiel "La Apostolo de la Arbo" De nia esperanta grupo kaj konsiderante la gravecon de Codorníu zorgante pri la forstumado de la dunoj, ni taksas positive ke oni dediĉu al li publikan spacon kiu memoros lia sindonemon al Guardamar kaj al Esperanto.

La grandaj bonfarantoj de la pinaro estis la arbar-inĝeniero Don Francisco Mira Botella (kiu realigis la dezajnon kaj plantadon de arboj en la dunoj) kaj Don Ricardo Codorníu Stárico (arbar-inĝeniero respondecanto pri la geografia zono de la baseno de la rivero Segura, kiu direktis la realigon de la projekto). Ambaŭ eminentuloj havas stratojn kun iliaj nomoj: el *Carrer Enginyer Mira* kaj la *Strato Ingeniero Codorníu*. Ambaŭ konfluigas ĉe kruciĝo, kiuj kunigas ilin tra malgranda rondo-kruciĝo.

Pro ĉio ĉi, la grupo de Guardamar proponas:

Unue: Honorigi la figuron de Don Ricardo Codorníu y Stárico, unue pro lia ekologia valoro nomumante per lia nomo tiun placo-forman ejon kiu estas kie kunigas la stratoj dediĉitaj al la inĝeniero Mina kaj al la inĝeniero Codorníu nomumante ilin kiel: *Placeta Codorníu* kaj due pro lia valoro kiel defendanto kaj enkondukanto de Esperanto en Hispanio, nomumante la rotondon kiu kunigas ambaŭ stratojn *Rotonda del Esperanto*.

Due: Munti ĉe la Placeta Codorníu plakon, kie estos indikite la sindonon de Codorníu en la foresto de las Dunas de Guardamar kaj ĝia enkonduko al Esperanto je nacia nivelo. Sur la Rotonda del Esperanto, dekoraciita per kvinpinta verda stelo (simbolo de Esperanto) kun la nomo de la rotondo.


Trie: Ĉirkaŭbari la "Rodal Eco-Literario-Esperantista", dehaki sekajn arbojn kaj instali kelkajn blankajn benkojn sur tiu spaco.

Kvare: Urĝi la Muncipalan Registaron de Guardamar del Segura havigi la necesajn rimedojn por ke ĉi propono realiĝu inaŭgurante ĉi tiujn ejojn la venontan monaton junio 2018, okaze de la datreveno de Codorníu (aŭ kontraŭe, antaŭ ol la okazigo de la Nacia Kongreso de Esperanto en Madrido).

Per ĉi tiuj agadoj, nia esperanta grupo pretendas fari dokumenton pri la priskribitaj agadoj por sia disvastigado kaj publikigado per la Hispana Esperanto-Federacio, des pli ĉar en ĉi jaro 2018 oni celebras la Hispanan Kongreson de Esperanto (de la 20a ĝis la 22a de julio) kaj la Universalan Kongreson de Esperanto en Lisbono (de la 27a de julio ĝis la 4a de aŭgusto). Kelkaj reprezentantoj de la Grupo de Esperanto Guardamar ĉestos en ambaŭ kongresoj.

Guardamar del Segura la 20an de marto 2018.

# LIBROPREZENTADO EN PRESTIĜA KULTUR-CENTRO DE MADRIDO



La 12-an de marto estis prezentita esperanta libro en prestiĝa kaj signifoplena loko: la kulturcentro Blanquerna de Madrido.

La libro estis *Tagoj kaj ruinoj*, taglibro verkita de la kataluna esperantista verkisto kaj intelektulo Jaume Grau Casas dum lia plur-jara restado en prizonkoncentrejoj en la sudo de Francio post la hispana interna milito. Ĝi kompilas tekstojn redaktitajn plejparte en la hispana, tradukitajn en Esperanton fare de Miguel Fernández, kaj eldonitajn de SAT-en-Hispanio kun la prizorgo de Pedro Sanz. La libro jam estis prezentita antaŭ esperantista publiko en la Hispana Kongreso en Teruelo kaj poste en la Kataluna Kongreso.

Tiu ĉi prezentado celis la eksteresperantan publikon.

Blanquerna estas institucio dependa de la delegacio de la registaro de Katalunio en Madrido, kies sidejo troviĝas en la strato Alcalá, fronte al la Círculo de Bellas Artes kaj apud la sidejo de la Banco de España. Ĝi unuafoje gastigas prezentadon de libro en Esperanto; kutime la libroj prezentataj estas en la kataluna aŭ en la kastilia kun rilato al Katalunio, kaj en tiu ĉi kazo la graveco de la verkisto kaj lia rilato al la kataluna kulturo (li estis interalie la ĉefredaktisto de la Kataluna Antologio, tre sukcesa eldono en la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento) ebligis tiun ĉi eksterordinaran gastigon.

La eventon prezentis José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kaj en ĝi partoprenis Miguel Fernández kaj Pedro Sanz, kiuj rakontis pri la aŭtoro, la cirkonstancoj de la verkado, la retrovo de la tekstoj kaj la nuna eldonado. La tutan prezenton eblas spekti en la kanalo de Jutubo de la kulturcentro Blanquerna.

---

## NOVA RENKONTIĜO EN MADRIDO EN JULIO

Alia internacia esperantista renkontiĝo okazos en Hispanio en somero: temas pri la tendaro organizata de la Verdaj Skoltoj. Ĝi okazos ekde sabato la 28-an de julio ĝis sabato la 4-an de aŭgusto, en Los Molinos, proksime al Madrido, en tre komforta loko, kies retejo kun fotoj estas vizitebla ĉe <http://casa.elcolladito.com/galeria-de-fotos/>.

La datoj estas elektitaj tiel ke junuloj povu poste viziti la Internacian Junularan Kongreson, okazontan en Badajoz inter la 4-a kaj 11-a de aŭgusto. Pliaj detaloj ĉe: [www.verdajskoltoj.net](http://www.verdajskoltoj.net).



**77-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO, 20-22 JULIO**  
**51-A KONGRESO DE ILEI, 21-28 JULIO**  
**Madrido, Hispanio, 2018**  
**LA KULTURA HEREDAĴO DE ESPERANTO**

**PROGRESAS LA PRETIGO DE LA KONGRESOJ EN JULIO EN MADRIDO**

La Loka Kongresa Komitato plu laboras en la pretigo de la du renkontiĝoj okazontaj dum tiu ĉi somero en Madrido: la Hispana Kongreso de Esperanto (20 - 22 de julio) kaj la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (21 - 28 de julio)

Memoru ke eblas jam enskribiĝi en ambaŭ (aŭ nur en unu, depende de viaj eblecoj kaj ŝatoj). La formularo aperis en pasinta numero de "Boletín", kaj vi povas fari ankaŭ pere de la reta formularo kiu troviĝas en nia retejo <http://www.esperanto.es/kongreso>, aŭ plenigante la dokumenton troviĝantan tie en formatoj doc kaj pdf. En tiu ĉi retpaĝo estas ankaŭ publikigata la listo de aliĝintoj al ambaŭ kongresoj.

Ankaŭ ene de la Kongreso de ILEI okazos akademia simpozio, kunlabore kun UNED. En nia retejo estas jam publikigita la alvoko al profesoroj kaj esploristoj kiuj deziros partopreni la Simpozion.

### PRAKTIKAJ INFORMOJ

#### SIDEJO

La kongresoj havos sian sidejon en la studenta rezidejo Teresa de Jesús, ene de la komplekso de rezidejoj (Colegios Mayores) de la Universitato Complutense de Madrido. Parto de la aktivadoj de la Kongreso de ILEI disvolviĝos en la sidejo de la Fakultato de Filologio de la UNED (Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado).

Ambaŭ lokoj troviĝas en la orienta parto de la urbo, en la universitata areo, en loko meze de parkoj, sed facile atingebla. La plej proksima metrostacio estas "Moncloa". El tie eblas veni per mallonga promeno al la sidejo, kaj ankaŭ eblas veturi per oftaj urbaj aŭtobusoj. Metrostacioj "Ciudad Universitaria" kaj "Príncipe Pío" situas ankaŭ proksime.

Ankaŭ eblas parki propran aŭton, sen grandaj malfacilaĵoj dum la someraj monatoj, en la komplekso de rezidejoj aŭ apud la universitato.

#### LOĜADO

La rezidejo Teresa de Jesús apartenas al komplekso de studentaj rezidejoj ("Colegio Mayor") de la Universitato Complutense de Madrido, kiuj situas unu apud la alia en la universitata areo, kaj kiujn ni utiligos por gastigado kaj okazigo de la surlokaj programeroj. Tie ni disponos je nombro da individuaj kaj duoblaj ĉambroj por gastigi kongresanojn, precipe tiuj venantaj por sep aŭ ok tagoj (t.e. la ILEI-kongreso aŭ ambaŭ).

Ekzistas renovigitaj ĉambroj kun klimatizilo en la C.M. Teresa de Jesús, ĉefa sidejo de la Kongreso. Pliaj ĉambroj disponeblas en la aliaj rezidejoj de la komplekso. Kvankam formale ili estas traktataj kiel apartaj rezidejoj, ili troviĝas tute apude.

Fotojn de la rezidejo Teresa de Jesús, inklude de la ĉambroj kaj aliaj instalaĵoj, videblas en tiu ĉi ligilo: <https://www.ucm.es/visita-virtual-cm-teresa-de-jesus>.

La prezoj inkludas 3 manĝojn tage (t.n. “pensión completa”) de lundo ĝis sabato; dum dimanĉo la manĝoj ne estas inkluzivitaj en la rezidejo. Homoj kiuj partoprenos dum ekskursaj tagoj povos mendi anstataŭan porteblan menuon. Ĉiuj dormoĉambroj havas privatatan banĉambrom.

Jen la prezoj:

Unu-lita ĉambro, kun klimatizilo: 40 €

Du-lita ĉambro, kun klimatizilo: 33 €

Unu-lita ĉambro, sen klimatizilo: 35 €

Du-lita ĉambro, sen klimatizilo: 30 €

Atentu ke la nombro estas limigita, kaj tial oni konsideros unue la mendojn de 7 aŭ 8 tagoj (de la 20-a aŭ 21-a de julio ĝis la 28-a de julio). La rezervoj estos konsiderataj laŭ strikta ordo de mendo kaj pago.

Eblas loĝi pli longe, por tiuj homoj kiuj venos pli frue al Madrido; informu la LKK-on pri tio. Probable eblos loĝi dum malpli da noktoj, se oni aliĝas nur al la Hispana Kongreso, sed tion oni povos certigi nur post junio.

Krome, Madrido estas urbo kun abundo da eblecoj por loĝi dum la somero. En la reto ni informos pri diversaj loĝejoj proksimaj al la kongresejo, por ĉies gustoj kaj buĝetoj, sed la LKK ne zorgos pri rezervado.

## KOMUNAJ MANĜOJ

La Kongreso organizos du komunajn manĝojn ekster la kongresejo.

La dimanĉon 22-an de julio, post la ekskurso al Alcalá de Henares, okazos tipe madrida tagmanĝo en konata restoracio Casa Mingo, komuna por la Hispana kaj la ILEI-Kongresoj.

La ĵaŭdon 26-an de julio oni organizos vespermanĝan bankedon en restoracio, por ILEI-kongreso kaj simpozio.

Eblos mendi menuojn vegetarajn kaj por aliaj specialaj postuloj.

## EKSKURSOJ

La LKK antaŭvidas kaj organizas tri ekskursojn en la ĉirkaŭaĵoj de Madrido.

Dimanĉe, la 22-an de julio, matene: ekskurso al Alcalá de Henares, la universitata urbo de la Madrida Regiono, naskourbo de Miguel de Cervantes kaj kun tre riĉa historio.

Merkredo, la 25-an de julio, tuttagan ekskurson al Toledo, iama ĉefurbo de Hispanio, juvelo de la historio kaj la arĥitekturo.

Merkredo, la 25-an de julio, tuttagan ekskurson al Segovio (Segovia), kun romiaj restaĵoj (tre bone konservita akvokondukilo) kaj impresa alkazaro (araba kastelo)

Depende de la bezonoj, oni povos organizi ekskursojn en aliaj tagoj.

Krome, la LKK organizas ekskursojn en la urbo, en diversaj tagoj. Tiujn oni ne bezonas rezervi nun.

Post la fino de la ILEI-kongreso, estas organizata komuna transporto al la Universala Kongreso en Lisbono. Ĝi eliros la 28-an de julio el la ILEI-kongresejo je la 9a horo kaj alvenos ĉe la UK-ejo inter la 17a kaj 18a horo. La prezo estos 40 € kaj necesas antaŭrezervi.

## KONTAKTO

Por aliaj informoj, bv. kontakti la LKK-on ĉe kongreso2018@esperanto.es aŭ ĉe la poŝta adreso: Federación Española de Esperanto, str. Rodríguez San Pedro 13, 3º-7, ES-28015 Madrid (Hispanio)





# BADAJOZ: JUNA KAJ ESPERANTISTA

La 4a de aŭgusto estos grava dato por la esperantistoj ĉi-jare. La IJK, la plej granda juna esperantista evento, okazos en Badajoz. Dum semajno, junuloj kaj korjunuloj ĝuegos la someron apud la rivero Guadiana.

La unua allogo de la renkontiĝo estas la IJK mem (festo, amikeco, kulturo... multege da Esperanto), la dua ke la UK (la plej granda Esperanto-kongreso) okazos malpli ol 200 kilometroj for, en Lisbono. Kia plejbona maniero ekzistas por ĝui someron inter amikoj en ĉi tiu belega urbeto? Ĝia dumiljara historio evidentigas la mikson de pluraj kulturoj, lingvoj kaj religioj. La arkitekturo, la kvanto da publikaj muzeoj kaj la kuirarto estas aliaj bonaj argumentoj kiuj helpas al ni ĝui Badajoz. Ne forgesu ke sia landlimo estas inter Portugalio kaj Hispanio, pluraj militoj tra la historio influis karakteron. Historio troveblas ĉie kie la rivero Guadiana akvumas la kamparojn kie trovi olivarbojn, vitoj aŭ batal-taŭrojn.

La partoprenantoj povos aŭskulti prelegojn pri psikologio, internaciaj rilatoj, vojaĝoj... aŭ partopreni dancokursojn, viziti la urbon, lerni novajn lingvojn... eĉ ludi batalon per akvglobetoj!

La nokto ne estos malpli mojosa. Ni organizos koncertojn de esperanta muziko (kaj ludos loka grupo en la hispana) sed ankaŭ teatraĵon, karaokeon kaj filmon. Sen forgesi ke la ĉiam okazanta gufujo del IJK aŭ la posta festumado ankaŭ okazos.

Je <http://ijk2018.tejo.org/> vi havas la informon kiu konvinkis pli ol cent homoj kiuj spertos loĝadon en Esperantujo dum unu semajno. Nun ke vi povos profiti tiun ĉi eblon proksime al vi, ĉu vi malŝparos ĝin?

Carlos Pesquera Alonso



## KUNVOKO POR INSTRUI EN UNIVERSITATNIVELA KURSO



Hispana Esperanto-Federacio nun intertraktas kun la UNED (Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado) pri la aldono de Esperanto al la listo de lingvoj instruataj en ĝia centro CUID (Centro Universitario de Idiomas Digital y a Distancia, Universitata Bitaj Neĉeesta Lingvo-Centro)

Se ĉio iras laŭ planite, ni subskribos interkonsenton, per kiu la kurso de Esperanto estos instruata per neĉeestaj rimedoj en la retejo de la UNED, kun oficialaj ekzamenoj kaj oficiala agnosko. La CUID zorgos pri la kunvoko de la kursoj. HEF kunlaboros i.a. rilate al la selektado de la homoj kiuj okupiĝos pri ĝi, interalie kunordigado de la instruado, pretigado de materialo kaj instruado.

Ni bezonas almenaŭ unu homon kiu pretas respondi pri la kunordigo de la projekto kaj la instruado (tutorado je distanco) dum la kurso 2018-2019 (proksimume 8 monatojn) plus ekzamenado. La laboro estos pagata. Ni kalkulas je proksimume 3.500 eŭroj/kurso laŭ la unuaj kalkuloj de la Universitato, sed la fina kvanto dependos de la nombro da lernantoj. Laŭ la unuaj interkonsentoj, la pago estos farata de HEF, laŭ fakturo, sen labora kontrakto.

La proceduro pri selektado estos malferma kaj objektiva, kaj en ĝi kunlaboros HEF kun la UNED, per la fiksado de kriterioj, kaj la partopreno en la decidoj. Inter tiuj kriterioj oni certe konsideros jenajn:

- Individua membreco en HEF aŭ en grupoj membrantaj en HEF
- Alta lingvonivelo, preferinde atestata per oficiala KER-ekzameno aŭ simila
- Studoj pri Esperanto, preferinde de la Interlingvistikaj Studoj de Poznan aŭ simile
- Sperto en instruado de Esperanto
- Sperto en instruado en universitataj medioj, preferinde per neĉeestaj rimedoj

Oni ankaŭ konsideros la certigon de la laboro dum la tuta periodo de la kurso.

Por la pretigo de la materialo oni planas la kreadon de skipo kiu kunlaboros en tiu tasko, kiu en la unua jaro estos sufiĉe grava. Interesatoj kiuj deziras kunlabori en tiu tasko, sed ne povas mem instrui, bonvolu sin anonci ankaŭ. Tiu tasko ne estos pagata, sed HEF provos iel kompensi la laboron kaj sendos atestilon, kaze ke ĝi povas taŭgi por la persona protokolo.

Krome, profesoro de la UNED, esperantista, kunlaboros en la praktikaj aferoj de kunordigado kun CUID.

HEF informos per siaj komunikiloj kaj per la sociaj medioj, sed se iu ano de HEF volas esti rekte informita pri la kriterioj kaj periodoj de selektado, bv. sendi mesaĝon rete al [kurso@esperanto.es](mailto:kurso@esperanto.es) aŭ papere al la poŝta adreso de la Federacio, montrante sian pretecon pri la tasko.

# MI PEQUEÑA GRAMÁTICA DE ESPERANTO


*Pri "Mi pequeña gramática de Esperanto" verkita de Peter Weide*

Nur 30 paĝojn! Mirinde! Weide sukcesas aranĝi en eta spaco egan enhavon. Kompreneble, oni ne rajtas esperi, ke tia gramatika manlibreto havos sufiĉan amason da ekzemploj kaj ĉiutagaj situacioj por plene posedi la lingvon. Tion eĉ ne atingas la fama PMEGo, kiu estas konata de preskaŭ ĉiuj, kelkfoje malfermita de multaj, parte studata de pluraj, kaj tralegita de preskaŭ neniu.

La Weidea libreto temas pri aranĝita promeno laŭ la Esperanta lingva vojo kaj tra ĝiaj eroj: kiuj ili estas (substantivo, verbo ktp), kiel ili miksiĝas por krei frazojn (afiksoj, akuzativo ktp), kio okazas pri kelkaj flankoj el la lingvo (tabelvortoj, komparadoj ktp), kaj kiel scii pli (datoj, utilaj retpaĝoj). Ĉiumomente, la aŭtoro klopodas sekvi la saman logikon por ĉiu lingva elemento: nomo, rolo, klarigoj, ekzemploj.

Vi havas en tiu paĝaro bonan ilon por apogi la lernadon de viaj komencantoj pere de rimedo, kiu povas roli kiel manlibreto por esti konsultata laŭbezone. Ne esperu luksan eldonon sed utilan. Kohere, ne esperu multekostan decidon. La kajero kostas 3,50 € plus sendokostoj, ĝi estas mendebla ĉe [peter.weide@mail.dk](mailto:peter.weide@mail.dk). Tamen vi povas mendi mil ekzemplerojn por via sukcesa kurso kaj atingi bonan rabaton. Pliajn informojn vi trovos ĉe la retpaĝo:<http://esperanto-gramatiko.saluton.dk/esperanto-gramatiko-superrigardo/espanol>.  
(Hispana versio: Ángel Arquillos)

Mi pequeña  
gramática  
de Esperanto



Vicente Manzano-Arrondo, Viko.

# MEMORE AL FABIENNE BERTHELOT

*Fabienne Berthelot, konata kiel esperantistino kaj kiel edzino de István Ertl, kun kiu ŝi havis tri gefilojn, forpasis pro kancero la 27an de januaro 2018, ĝuste kiam mi estis ĵus fininta mian lastan poemaron, “Rev-ene”, baldaŭ aperontan. Kor-tuŝite, mi aldonis al ĝi ĉi poemon kiel “lastan kanton” omaĝe al ŝi kaj dediĉe al mia kara amiko István Ertl.*

Ni devintus Lisbone renkontiĝi,  
kiam la verdo de l’ rivero Taĵo  
iĝos spegulo de tutmonda eĥo.

Mi volis al vi kanti *Nessun dorma*  
kaj *Ne me quitte pas* ĉe riverbordo,<sup>1</sup>  
la kantoparon, kiun vi plej amis.

Sed tio ne plu eblos.  
Iu sciigis min, ke vi forpasis,  
ho fratiniĝo per la piko de la murdema kankro.  
Kaj ambaŭ kantoj iĝis ĉe mia gorĝo ploroj,  
kaj Lisbon’ per-faduas de nun vian foreston.

Estul’ amata mortas,  
kaj la tuta naturo renversiĝas.  
Vanas la teron mini vorto-trove.  
Ne elfoseblas vortoj en la kosmo  
kapablaj meti buŝumon ĉi-doloren.  
Sed ĉiuj vortoj – vi pravas, István – sencas,  
ĉar ili helpas la morton supervenki.  
Tial mi pripoemas mian ploron.

Kaj ricevas la lumon de via rido pura,  
dum vi transvivas vin per viaj amoj.  
La memoro pri vi ŝprucigas vivon.  
Per ĝi la papavetoj papilias  
kaj la kometoj revas iĝi sunoj.  
Kaj la taktoj de l’ karaj *Nessun dorma*  
kaj *Ne me quitte pas* iĝas animo,  
kiu sorigas nin en la eternon.

Miguel Fernández

---


<sup>1</sup>*Taĵo* (hispane Taĵo [taĥo], portugale Tejo [teĵu], aliaj esperantigoj Taĥo, Tago, Taguso) estas rivero en Iberio, traŝiranta Hispanion kaj Portugalion. La nomon *Taĵo*, kompromisan inter la portugala kaj la hispana, ekuzis en esperanto unue Leopoldo Knoedt en sia traduko *La Luzidoj*, poste diversaj membroj de la Ibera Skolo”. (Vikipedio).

---

# LA 9-A TAKE ESPERANTO KUBO OKAZINTA DE LA 11A ĜIS LA 17A DE FEBRUARO 2018

La hor-zono ne ĝenis min en Kubo, sed en Hispanio, jes, ĉar tie mi gajnis ses horojn kaj ĉi tie mi perdis ilin, tamen mi feliĉas pro la neforgesebla sperto ĉe la Kariba Maro kaj la bona etoso inter simpatiaj kaj bonkoraj homoj.

Ĉe la diversaj gastejoj, t.e. dometoj kaj hoteloj mi estis vere komforta. En tiu lando mi ne sentis min eksterlandano, eble pro la sinteno kaj la lingvo kaj humileco de tiaj bonkoraj kaj gajaj homoj.



La kongresejo estis simpla, sed alloga, sufiĉe granda en tri-stela hotelo kun granda naĝejo kaj scenejo por ĝui spektaklojn pri kuba muziko en Esperanto kaj bongustajn trinkaĵojn kun netradukeblaj nomoj kiel: "mojito", "piña colada", "cuba libre", ktp. Por tagmanĝo aŭ vespermanĝo, ili kuti-

mas ne nur trinki bieron aŭ akvon, ili ofertas la menciitajn trinkaĵojn, kiujn ni hispanoj bone konas, sed ne por akompani manĝojn, sed por la postmanĝo aŭ alia momento.

La Nacia Belarta Muzeo estis alloga kaj belega ejo kie oni okazigis la Solenan Malfermon kun ĉeesto de la Vicministro de Kulturo, kiu lerte prononcis kelkajn frazojn en Esperanto kaj post la salutvortoj de la reprezentantoj el pluraj landoj, inter ili Hispanio (mi salutis nome de HEF kaj AEU) kiel vicprezidanto kaj prezidanto de ambaŭ asocioj, ne mankis gitar-koncerto interpretita de Jany Quiñones Valdés, diplomita pri muziko, lerta esperantistino naskiĝinta en Kubo. La inaŭguro komenciĝis per la nacia himno de Kubo kaj finiĝis per *La Espero*.



La programo estis vere interesa kaj varia, ĉar la kongresejo disponis je kelkaj salonetoj por okazigi la plurajn prelegojn kaj teatraĵojn kiel: 43 Amo-Seminario, UEA/ILEI ekzamenoj, Ateliero Origamio, Tablo kaj tabloludoj, Dancateliero, Konversacia rondo, Literatura rondo. Prelego de Orlando Raola "Ne nur... sed ankaŭ: leteroj de plumamiko", Yumeiho-terapio gvidita de Francisco Briel de Cañas, kuba industria inĝeniero; la germano Harald Schicke paroladis pri la germana sansistemo, kiu estas unu el la plej multekostaj en la mondo. "Ĉigongo por la sano: rajto de la popolo", ĉina ideo por plifortigi la korpon kaj kuraci malsanon per sporto, estis la prelego de Mayra Núñez Hernández, kubano. "La moderniga projekto de José Martí por Latinameriko", prelego de fama kuba esperantista poeto kaj bona amiko mia, Juan Lázaro Besada. Estis multaj prelegoj kaj mi nur mencias la titolojn por ne enuigi vin. "La guayabera", "Vortaro ne nur nia", "Historio de Esperanto en Santiago de Kubo" (ĉi prelego temas pri eldonita libro pri historio de E-o en Santiago de Kubo), "Esperanto en la kuba radioamaterismo", "Sanigaj efikoj de korea ginsengo", "La kultura projekto Amindaj", "Tradicia-teknologia trairado", "Teoria kaj metodologia konceptigo por gvidado de la instrua kaj lernaj procezoj de la angla kaj Esperanto", "Kubo sin prezentas", "Sankterio kaj afrokuba etoso", "Kuba Tajĝičuan", "Panoramo de la kuba folkloro muziko".

Mi ne forgesos la jam faman paron Sara Spanò kaj Francesco Maurelli, ŝi prelegis pri UEA kaj li, krom ludado de piano, prelegis pri TEJO. Vilhelmo Lutermano prelegis pri



MAS, (Monda Asembleo Socio kunfondita de li en 2005 dum la 5-a Kongreso de Kuba Esperanto Asocio [KEA]). La titolo de la prelego estis: "Kiel eldoni vian libron ĉe MAS?" Ankaŭ SAT faris preleg-reklamon pri la 91-a Sat-Kongreso okazonta en Kragujevac (Serbio).

Dum la Internacia Vespero ni ĝuis la muzikon de la neesperantista bando *Kialo*, kiu ankaŭ kantas en la internacia lingvo kaj la ensemblo *Amindaj*, (esperantistoj), kiu tre plaĉis al mi. Kaj du simpatiaj fratoj, Jaime kaj Jarcin, artistoj el Contraestra (Santiago de Kubo) regalis nin per varia programo pri danc-muziko, kiel la jam fama verko "Take, take", interalie.

En la teatrejo Raquel Revuelta, la famaj mondkonataj esperantistaj artistoj Saša Pilipoviĉ kaj Georgo Handzlik prezentis la konatan teatraĵon "La krediton".



Pri ekskursoj, mi partoprenis preskaŭ ĉiujn, inter kiuj mi elstarigas: “Havano trarigardo”, promonado tra la malnova kaj historia urbo “Laŭ la vojo de Hemingway” (vizito al la domo de la verkisto kaj ĉirkaŭaĵoj), “Tuttaga ekskurso al la Nacia Parko Viñales”, “Las Terrazas” (deklarita de la UNESKO rezervejo de la biosfero), “Rio San Juan”, “Orientaj plaĝoj” (la

plej konata el ili estas Santa Maria del Mar kun abunda fajna sablo)”, “Cienfuegos”, (kun trarigardo de la urbocentro gvidata de lokaj geesperantistoj, vizito al teatroj Terry kaj Parko Martí), “Trinidad” (vizito al muzeo ĉe la ĉefplaco kun lokaj esperantistoj kaj ekskurso al plaĝo Ancón kaj promonado tra la urbocentro), Sancti Spiritus, (ĉefurbo de la samnoma provinco, promonado kun lokaj esperantistoj, vizito al la Muzeo de Kolonia Arto kie oni vidis kiel vivis tiame tre riĉa familio), “Santa Clara” (en ĉi lasta urbo, pro la pluvo ni ne vizitis la muzeon pri Che Guevara, nur la maŭzoleon kun la impona skulptaĵo de la fama revoluciulo Che. Estas neeble priskribi ĉion, imagu, ĉar la raporto fariĝu eĉ teda. Ni tranoktis kaj en Viñales, Cienfuegos, Sancti Spiritus kaj Santa Clara en komfortaj dometoj kaj luksaj hoteloj. La organizantoj vere dorlotis nin.



La aŭkcio estis emocia momento por mi, ĉar oni vendis du el miaj poemaroj donacitaj de mi kaj diversaj objektoj por helpi la asocion.

Valoras la penon viziti Kubon kaj mi de nun pripensas la aferon flugi denove por ĝui ne nur la allogan etoson inter kubanaj gesamideanoj, sed ankaŭ la belecon de tiu mirinda insulo kun nekredebla klimato.

Ángel Arquillos

# FORPISIS EMILIO GASTÓN SANZ

Homo kun radikoj kaj flugiloj

Emilio Gastón Sanz mortis en Zaragozo la 22an de januaro de 2018, kiam li estis 83-jara. Li estis grava figuro en la socio, kulturo kaj politiko de Aragono. Kiel advokato li brave kaj prave defendis al nepotenculoj. Li partoprenis en la fondo de la Socialisma Partio de Aragono (PSA) kaj estis deputito en la Hispana Kongreso (1977 – 1979). Li estis la unua Aragona Popoldefendanto (aŭ “ombudsmano”) dum la demokratia epoko (1987 – 1993), posteno ĉi tie nomata "Justicia de Aragón" [vidu n-ro 284 de "Boletín"]. Kaj inter aliaj virtoj... li estis esperantisto.

La familio Gastón gravis en la historio de Esperanto. Lia avo, Emilio Gastón Sanz estis unu el la fondintoj de la asocio FRATECO en 1908 kaj post la Unua Mondmilito li estis kunordiganto de la gastigado de aŭstriaĵ infanoj en Hispanio. Ties filinoj Inés kaj Emilia estis eble la unuaj denaskaj esperantistinoj. Inés estis Sekretariino de HEF kaj redaktorino de “Boletín”. Aliaj membroj de la familio same simpatiis al Esperanto.

Li partoprenis la 13an de decembro de 2008 en la oficiala inaŭguro de monumento dediĉita al Esperanto. Ĝi okazis kadre de la 100-jariĝo de la Esperanta-asocio "Frateco". Li parolis pri la grandaj revoluciaj ide(al)oj: Libero, Egaleco kaj FRATECO.

Li ankaŭ partoprenis kiel honora invitito kaj kiel preleganto en la inaŭguro de la 72a Hispana Esperanto-Kongreso celebrita en Zaragozo en majo de 2013 [videbla en "youtube"]. Li recitis sian lirikaĵon “Somno solvi” en la hispana kaj voĉlegis ties esperantan version, "Rompita dormo", en traduko de Miguel Fernández [vidu n-ro 402 de “Boletín”], kies fino jenas:

[...]

*Ni devas multe fari en kuneco,  
revuloj ĉiulandaj,  
ĉu do ni unuiĝu?*

Dum la funebraĵoj oni petis ke esperanta flago estu inter ties personaj simboloj kiel lasta akompano. Kaj tiel ĝi estis. Ripozu pace tiu "nubopensulo".

*Lorenzo Noguero*





# FORPASIS PEPITA DE CASPARY



La 27an de marto 1932 naskiĝis knabino en Katalunio, parto de la hispana respubliko. Ŝiaj gepatroj, Antonio Criach kaj Antonia Galbany, estis maldekstremaj respublikanoj, kaj al sia filino ili donis la nomon Llibertat (t. e. Libereco). Kiam post la hispana interna milito oni postulis, ke ĉiuj hispanoj estu baptitaj, la eklezio ne aprobis tiun nomon. Ĉar la knabino tiam jam havis 7 jarojn, la gepatroj petis ŝin mem elekti, kiel ŝi volas nomiĝi. "Pepita", ŝi respondis, kaj sub tiu nomo ĉiuj konis ŝin. Tiu "knabineto" forpasis la 12an de decembro 2017 en la malsanula hejmo Søndre Borgen, en Asker apud Oslo (Norvegio).

Jam estante infano, Pepita estis parte paralizita, eble pro tro frua naskiĝo, eble pro poliomjelito, kaj tiu movhandikapo laŭgrade evoluis dum la resto de ŝia vivo. La gepatroj opiniis, ke ŝi tamen povos iĝi utila civitanino, kaj ili zorgis, ke ŝi edukiĝu kiel artflikistino. Ili ankaŭ volis doni al ŝi vastan internacian horizonton, kaj tiucele ili instigis ŝin lerni Esperanton. Tiu lingvo okupos gravan lokon en la vivo de Pepita.

En la UK en Haarlem 1954 ŝi konatiĝis kun norvego, Herbert de Caspary. Ili komencis interkorespondi, kaj en 1956 Pepita transloĝiĝis al Asker kaj edziniĝis kun Herbert. Tiel Pepita Criach fariĝis Pepita de Caspary. Ili uzadis Esperanton kiel hejman lingvon, kaj iliaj du infanoj estas denaskaj parolantoj de Esperanto. Precipe kiam ili estis malgrandaj, Pepita kaj Herbert invitis norvegajn kaj alilandajn Esperanto-parolantojn al sia hejmo, por ke la infanoj spertu la praktikan uzon de Esperanto.

Dum la unuaj jaroj en Norvegio Pepita laboris en teksaĵfirmao, sed kiam la familio pligrandiĝis, ŝi ĉesis labori tie, sed dum multaj jaroj ŝi praktikadis artflikadon hejme, riparante vestaĵojn por klientoj.

Jam en 1958 Pepita elektiĝis en la estraron de Klubo Esperantisto en Oslo, kie ŝi malkrokodiligis la ceterajn estraranojn. De 1958 ĝis 2009 ŝi havis diversajn postenojn en la klubo, i.a. ŝi estis prezidanto 1973 - 1980 kaj 1992 - 1995, kaj vicprezidanto 1988 - 1992 kaj 1995 - 1997. Se mankis kandidato por iu posteno, la solvo ofte estis demandi al Pepita, kaj ŝi akceptis, ĉiam helpopreta - kun unu escepto: kasisto ŝi ne volis esti! Sed preskaŭ ĉiujn aliajn postenojn ŝi iam havis. Dum kelkaj jaroj ŝi ankaŭ stencilis kaj multobligis la Kluban Bultenon. Ŝi havis postenojn ankaŭ en la estraro de Norvega Esperantista Ligo.

La helpopreteco de Pepita koncernis ankaŭ la klubajn programojn. Se mankis programo por iu kunveno, oni ĉiam povis peti, ke Pepita faru ion, kaj ŝi kontribuis, de 1956 (kiel Pepita Criach) ĝis 2009, per programoj pri la plej diversaj temoj, de propraj travivaĵoj kaj vojaĝpriskriboj ĝis sociaj kaj kulturaj temoj. Konstanta programero ĉiu-aŭtuna estis, ke Pepita kunportis lastsomerajn produktojn el sia ĝardeno. Tiam la ĉeestantaro devis eltrovi, kiel ĉiuj strangaj kreskaĵoj nomiĝas en Esperanto!

Kiam la movhandikapo de Pepita iĝis tiel granda, ke ŝi havigis al si radseĝon, ŝajnis al ŝi, ke donis al ŝi pli da libereco la "rulseĝo", kiel ŝi nomis la ilon, paŭsante la norvegan terminon. En unu klubkunveno ŝi entuziasme rakontis pri siaj spertoj en Beitostølen, centro de "sansporto", do sporto adaptita ankaŭ al handikapuloj. Ŝi membriĝis en organizaĵoj de handikapuloj, kaj ankaŭ en pluraj aliaj organizaĵoj, i.a. la Civitan-klubo de Asker, la Ruĝa Kruco, kaj loka sekcio de asocio de dommastrinoj.

Entute Pepita estis homo vasthorizonta, grand-engaĝa kaj solidarema. Ŝi estis societema kaj gaja, ŝi havis infektan ridon, resume, al sia ĉirkaŭantaro ŝi efikis kiel vitamin-injekcio. Dum la lastaj jaroj ŝia malboniĝanta sanstato kaŭzis, ke ŝi ne plu povis esti tiel societema kaj komunikema, kiel ŝi dezirus. Sed ni havas abundon da helaj memoroj pri ŝi, kaj ilin ni konservos!

Otto Prytz

51a ILEI  
KONGRESO  
77a HKE  
MADRIDO 2018

77-a Hispana Kongreso de Esperanto  
20-22 julio  
51-a Kongreso de ILEI  
21-28 julio

# LA KULTURA HEREDAJO DE ESPERANTO

